

O BRASIL ESPERANTISTA

ORGÃO OFICIAL DA "LIGA ESPERANTISTA BRASILEIRA" — Sociedade de utilidade pública.
NOVA FASE DO "BRAZILA ESPERANTISTO"

Número 91-93 (377-379)

Telegrafa adreso: ESPERANTOLIGO

Julho-Setembro 1945

Redator responsável:
Dr. Carlos Domingues
Telefone — 42.4357

Administração e redação:
Praça da República, 54-sob.
Rio de Janeiro. Brasil.

Gratuito para os sócios da Liga.
Eksterlande: Unu dolaro aŭ 15
respondkuponoj.

LA NUBOJ FORPASAS

Estas nun preskaŭ ses jaroj de la komenco de la milito; 68 monatoj dum kiuj ekzistis multaj malagrabloj, limigoj, malpermesoj. La tempo ŝajnis tiom senfina ke nun, en la unuaj tagoj post la fino de la batalado en Eŭropo, oni apenaŭ povas imagi ke la fino ja alvenis. Ankoraŭ daŭras la milito en la oriento, malfeliĉe, sed unua fazo — kredeble la pli longa — estas finita.

Ne plu ni aŭdas falantajn bombojn; ne plu okazas eksplodoj de senavertaj raketiloj; ne plu estas necese tiri la kurtenojn nokte ... Certe ankoraŭ restos kelkaj malpermesoj dum plimalpli longa tempo, sed super ĉio regas la penso, ke ni povas koncentrigi multe pli grandan parton el niaj fortoj al konstruo anstataŭ al detruo.

Por la enloĝantoj de la liberigitaj landoj la ŝanĝo estas eĉ pli granda. Ree venas libera kontakto kun aliaj landoj, popoloj, parencoj, amikoj, tiel baldaŭ kiel oni povas aranĝi la poŝtajn kaj aliajn servojn. Denove ni povos baldaŭ renkonti unu la aliajn. Sed en niaj vicoj estas mankoj: multajn amikojn ni ne plu vidos; ni tenu ilin en nia memoro.

De aliaj ni ne scias la sorton, kaj inter tiuj estas familianoj de nia Majstro. Denove ni faras enketon, kaj ĉi tiun foton espereble ni havos sukceson, sed oni facile komprenos ke tiu enketo eble daŭros longe pro la okazintaĵoj en Varsovio. Tuj kiam ni ricevos *fidindan* informon, ni diskonigos ĝin. Nun

ni povas informi niajn legantojn ke D-ro Julius Zamenhof estas en Sud-Afriko, kaj S-ino Mario Zamenhof-Szper estas en Siberio. Per la helpo de la Palestina Esperanto-Ligo ni sukcesis sendi al ŝi pakajon. (1).

En San Francisco nun ŝtatestroj kaj diplomatoj laboras kun la celo starigi mondorganizaĵon, kiu malebligos militon estonte. Certe ĉiu deziras al ili sukceson. Al ni ŝajnas, ke finfine tiu

sukceso dependos de la bonvolo de ĉiu naciانو; kaj tio plejparte dependos de persona amikeco inter la popoloj, ĉar tio igas la senton kontraŭ milito pozitiva anstataŭ pasiva. Sekve, la universala adopto kaj uzo de Esperanto multe helpos al tiu sukceso.

Ni, kiel Esperantistoj, daŭrigos nian laboro eĉ pli vigle ol antaŭe. Kiam estos eble denove vojaĝi IEL aranĝos la Universalajn Kongresojn, eble ankaŭ konferencojn, por faciligi la internacian amikecon, kaj por diskuti diversajn planojn rilate al la uzo kaj disvastigo de nia lingvo. Certe oni jam rimarkis la pli grandan internaciecon de la artikoloj en *Esperanto Internacia* lastatempe; tio pligrandigos, kaj kiam ni sukcesos havigi pli da papero la gazeto estos pli multpaĝa kaj pli ofta.

Ni ne estas diplomatoj nek ŝtatestroj, sed ni povas direkti nian influon al la paco per nia internaciana laboro. Jes, ni unuope; ni grupe; ni federacie; ni en la organizaĵo konsistanta el ni ĉiuj — INTERNACIA ESPERANTO-LIGO.

(El "*Esperanto Internacia*", Majo-Junio 1945).

(1) El la Julia-Aŭgusta numero de "Esperanto Internacia" ni elĉerpis la jenon: "La Familio Zamenhof. Ni ricevis informon ke F-ino Roma Zamenhof, filino de Felix Zamenhof, ankoraŭ loĝas en Varsovio. Lastmomente venis informo ke S-ino W. Zamenhof kaj Ludoviko (edzino kaj filo de Adam Zamenhof) ankoraŭ vivas en Varsovio.

PACO

Dio! Dankon al Vi el tuta koro,
Ke Vi konsentis pacon al la Tero!
Brilas denove lum' en la karcero
De nia pilgrimado kaj doloro!

Paco! Ni ĝin jam perdis el memoro!
Diru, ke ni ne songas; ke sufero
Estas nur pasintaĵo, kaj mizero —
Neniam plu, neniam plu, Sinjoro!

Dankon, Patro! Por ĉiam Via nomo
Laŭdojn ricevu de la kruda homo,
Kaj al nuboj leviĝu nia kanto!

Se lingvojn ĉiajn vere Vi komprenas,
Babilona konfuze nin katenas:
For P' anima Babel' — per Esperanto!

5-9-45

Porto Carreiro Neto

D-ro Getulio Vargas, prezidanto de la Brazilia Respubliko, plialtigis ĝis la sumo de Cr\$ 5.000,00 (250 dolaroj) la nunjaran subvencion al "Brazilia Ligo Esperantista".

ĈU APERONTA PROJEKTO IAM ANSTATAŬOS ESPERANTON ?

D-ro Zamenhof iam diris, ke la leĝoj de la inerteco, kiuj dum longa tempo estis kontraŭ ni, nun jam laboras por ni. Tiu aserto estis vera kiam la Majstro ĝin eldiris kaj estas pli vera nun. La pioniroj de nia movado havis kontraŭ si la jarmilan opinion, ke lingvo artefarita ne povas vivi, kaj ili devis energie bataladi kontraŭ tiu antaŭjuĝo forte enradikiĝinta ĉefe ĉe lingvistoj. Per multjara pacienca laborado, niaj pioniroj venkis tiun eraran konvinkon kaj starigis klaran certecon bazitan sur faktoj, ke Esperanto vivas tute nature kaj elvolviĝas ĉiam. Novaj elpensoj, novaj eltrovoj, novaj ideoj, tuj akiras nomojn en Esperanto same kiel en ĉiuj vivantaj lingvoj, kaj tio montras, ke Esperanto ankaŭ estas vere vivanta, ĉiam kreskanta lingvo. D-ro Zamenhof mortis antaŭ 28 jaroj, sed kiom da novaj ideoj jam aperis en la mondo post lia morto, kaj ĉiu nova ideo enkondukis novajn esprimojn en la lingvon. La regula derivado en Esperanto permesas al ĉiu esperantisto en la mondo enkonduki novajn esprimojn en la idiomon sen iu ajn bezono de centra aŭtoritato por ilin aprobi. La tasko de nia Lingva Komitato estas nur de temp' al tempo oficialigi aposteriore la radikojn, kiujn la uzado de la lingvo plene akceptis, same kiel la Akademioj por la vivantaj lingvoj.

La vivanteco de Esperanto venkis la antaŭjuĝon, ke artefarita lingvo ne povas vivi, kaj kuraĝigis aliajn lingvistojn ellabori novajn projektojn. Sed tiuj projektoj venis tro malfrue, ĉar la publika opinio ne nur akceptis la ĝeneralan ideon, ke artefarita lingvo povas vivi, sed pli difinite ĝi akiris la konvinkon, ke la problemo estas finsolvita per Esperanto kaj oni ne plu devas ĝin diskuti.

En la brazila gazetaro aperis tre bonaj artikoloj ridindigantaj la projekton *Basic English* kaj ties naivajn propagandistojn, fare de personoj, kiuj ne scias nek propagandas Esperanton, sed estas tute konvinkitaj, ke Esperanto estas la lingvo internacia. Tiun informon ili plurfoje legis kaj aŭdis jam de jardekoj kaj nun ili tiel certe scias pri la ekzisto de la helplingvo internacia Esperanto, kiel pri la ekzisto de la ĉina lingvo, kvankam ili neniam intencis lerni tiujn du lingvojn.

Tiu tutmonde diskonita scio pri la ekzisto kaj funkciado de Esperanto kiel helpa lingvo internacia fariĝis rutino kontraŭ ĉiu nova projekto ape-

rinta post Esperanto; kaj se neniu el tiuj projektoj jam aperintaj sukcesis vivi, la estontaj projektoj havas ankoraŭ malpli da ebleco vivi, ĉar la propagando de Esperanto kreskas ĉiam pli forte fermante la vojon al novaj projektoj.

En la Ĝenerala Raporto de IALA por la jaro 1945, mi legas sur la paĝo 12a:

“Ekzistas pli ol ses mil libroj kaj pamfletoj en Esperanto kaj la lingvo estas uzata en internaciaj konferencoj, en vojaĝoj, kaj en kontinua publikgado de gazetoj. Ĝi estis serioze konsiderita por oficiala lingvo de la Ligo de la Nacioj, sed ne adoptita. De longe ĝi estas la sola larĝe konata konstruita lingvo, kaj la nomo Esperanto estas praktike sinonimo de la termino helpa lingvo en la popola menso”.

Sur la 53a paĝo de la sama Raporto, mi legas:

“En jaraj Esperanto-Kongresoj kaj en specialaj konferencoj organizitaj de Esperantistoj pri edukado, komerco, kaj sciencoj, tiu lingvo estis sukcesplene uzita. Tamen, evidenteco montris ke duona jarcento da propagando fare de sindonemaj esperantistoj ne sukcesis uzigi tiun konstruitan lingvon en la ĝenerala kampo de la internaciaj konferencoj.”

Post tiuj argumentoj, IALA decidis kaj denove promesas, kiel ĝi jam faradas dum la lastaj dudek unu jaroj, ke ĝi, IALA mem, estonte prezentos novan projekton, kiu, tute simile al la atombombo, ĉion venkos. Tiu 21-jara kovado pligrandigas la fiaskon de la estonte aperonta (?) projekto, se ĝi vere iam aperos. Eble ĝi neniam aperos, ĉar per forpasado de jardekoj homoj maljuniĝas, pesimistiĝas, forlasas idealojn kaj mortas.

Se ĝi vere iam aperos, ĝi devos iri la saman malfacilan vojon de ĉiuj novaj projektoj: publika diskutado, disputoj pri ŝanĝoj, refarado, internaj malkonsentoj de la adeptoj kaj atakado fare de eksteraj malamikoj.

El la Raporto oni konstatas, je ĉiuj esperoj de la aŭtoroj de la projekto estas en ties uzigo, ne en ties realaj meritoj. IALA trudos ĝin sendiskute al la mondo kiel la Akso Romo-Berlino-Tokjo estis trudika. Unue, dum la kovado, ili varbos registarojn, gravajn mondasociojn, gvidantojn de mondmovadoj por la protekto kaj post

apogo donita de tiuj fortoj al la birdido en la ovo, ĝi rompos la ovselon kaj aperos en triumfa venko antaŭ la mirigita simpla popolo, kiu devos akcepti ĝin kiel *fait accompli* en la samaj kondiĉoj kiel germanoj kaj japanoj akceptis la pacon, t. e. senkondiĉe, per simpla kapitulaco.

La demokratia sistemo de Esperanto ne ŝajnas bona al IALA, ĉar ĝi estas malrapida kaj certe pereiga por novaj projektoj postmorte naskitaj. La faŝisma sistemo estas pli rapida kaj tial IALA ĝin preferos. Sed evidenta eraro estas tiu plano de akceptigo. En la unua tempo ĝi povos eviti diskutadon kaj atingi blindan akcepton fare de aŭtoritatoj, kiuj ne estas mem kompetentaj pri tia nova afero; sed la diskutado venos post la naiva akcepto de la ne ankoraŭ provita projekto. Tiuj aŭtoritatoj iom post iom ekscios, ke kontraŭ la projekto ne provita kaj aprobita en la ovo nur de ĝiaj aŭtoroj mem, ekzistas alia multe pli bona jam postaprobata de uzantoj de ĉiuj klasoj, en ĉiuj landoj, kaj vere vivanta. Kiam tiu konscia stato fariĝos — kaj ĝi nepre iam fariĝos — la ĉiopovaj trudintoj de la projekto estos en situacio iel komparinda kun tiu de la faŝistestroj dum la lastaj tagoj de la dua mondmilito. Ĉar vere la procedo akceptigi blinde ion ne ankoraŭ ekzistantan estas danĝera ruzaĵo mallongvida. La honesta kaj longvida procedo estas prezenti unue la projekton por mondiskala diskutado, kiel faris D-ro Zamenhof kaj ĉiuj aliaj aŭtoroj ĝis nun.

Per la Akso-sistemo la diskutado venos malfrue, kaj kun ĝi nepre venos reformoj kaj embarasiga situacio por la aŭtoroj kaj por la aŭtoritatoj, kiuj blinde aprobis la neelprovitan kaj nekonitan projekton.

Sed mi iras tro malproksimen!

Jam de dudek unu jaroj IALA kovadas kaj ĝis nun prezentis nur tri malsamajn specimenojn de projektoj neniel finitaj kaj eble neniam finotaj. Eble la esperoj de IALA per tiu kuirado en malvarma akvo estas senkuraĝigi la esperantistojn per tiu konstanta minacado de atombombo, sed neniam ĝi kuraĝos malsupreniri en la arenon, aŭ eĉ deziras nur mortigi la mondlingvan ideon pro imperialismaj motivoj. Iel ajn la projekto — se ĝi iam aperos — trovos la pordojn fermitaj, ĉar la publika opinio tra la tuta mondo jam ligis la ideon de helplingvo internacia kun Esperanto kaj tial



SANTOS DUMONT — LA AERPIONIO. Originalo de Prof. A. Brigole kaj traduko de Maria A. Malheiro. Ilustrita 32paĝa libro kun 21 ilustraĵoj kaj arta kovrilo. Eldonita de la Ministerio por Eksterlandaj Aferoj, kiel memoraĵo de la Deko Brazila Kongreso de Esperanto. Krom la portreto de Santos Dumont, de ties patro kaj de la aŭtoro, ĝi enhavas tiun de Archdeacon, granda amiko de Santos Dumont kaj Prezidinto de la Franca Societo por la Propagando de Esperanto. Presejo de Irmãos Pongetti.

la inerteco jam laboras nur por Esperanto. Grandskala propagando por alia projekto nur helpas la ideon kaj utilos al Esperanto, kies firma progresado sub plena taglumo ne povos esti haltigata per ruzaĵoj.

Ĉiuj novaj projektoj nur helpas nin. Jam estas tiel malfrue por solvi de nove tiun problemon kiel por retrudi al la mondo la registemojn de la Mezepoko. Per rapidaj, ruzaj movoj, la faŝistoj sukcesis revivigi la mezepokan sistemon kontraŭ Demokratio; ili eĉ okupis Etiopujon kaj grandan parton de Eŭropo kaj Azio. Tamen, ilia triumfo estis nur ŝajna, kaj tre frue falis, ĉar Demokratio jam estis enradikiginta kaj nepre devis triumfi kontraŭ perfortemo de kelkaj aŭtokratoj.

Post la tutmonda honesta kaj senartifika propagando de Esperanto, la publika opinio estas fermita kontraŭ aliaj projektoj; tamen, grandskala propagando de alia projekto ĉiam helpas nin, se ĝi iam venos, ĉar ĝi aten-

La Nacia Konsilantaro de Geografio kaj Esperanto

La Ĝenerala Sekretario de la Nacia Konsilantaro de Geografio, D-ro Cristovam Leite de Castro, sendis al la Prezidanto de la "Deka Brazila Kongreso de Esperanto", Ambasadoro José Carlos de Macedo Soares, je la 19a de Aprilo, la jenan oficialan leteron: "Estas al mi honoro sciigi Vin, ke la Centra Direktantaro de tiu ĉiu Konsilantaro, ĉe la hieraŭa kunsido, decidis registri voĉon de viva simpatio al la Deko Brazila Kongreso de Esperanto, kiu nun okazas en tiu ĉi ĉefurbo, sub Via klera prezidanteco kaj entuziasma kaj efika partopreno de multnombraj kaj valoraj kongresanoj.

"2. La elmontraro de la Centra Direktantaro esprimas la solidarecon donatan de tiu ĉi Konsilantaro al la esperantista movado en Brazilo, kiu ne limigadis je la spirita tereno, ĉar ĝi havis konkretajn iniciativojn, nome, inter aliaj, la publikigadon de esperantaj tradukoj de ĉiuj artikoloj aperintaj en la "Brazila Revuo de Geografio", kio okazas ekde la jaro 1939a, la kunlaboradon ĉe la preparaj laboroj de la Deko Brazila Kongreso de Esperanto, la preparon de la skema Mapo de Brazilo kun teksto en Esperanto, kiu estas elfinata je memoriga eldono de tiu Kongreso.

"3. Tiu ĉi Sekretariejo aliĝas al la honorigo de la Centra Direktantaro kaj esprimas la plej sincerajn kaj varmajn voĉojn, por ke la nuna Kongreso de Esperanto donos la fruktojn, kiujn ni ĉiuj deziras, profite de la plej granda disvastiĝo en la Lando de la genia elpensado de Zamenhof.

Mi prezentas al Vi la reajn protestojn de mia alta estimo kaj ŝato". (Sub. *Cristovam Leite de Castro*. Ĝenerala Sekretario).

tigos pri la ĝenerala ideo de helplingvo internacia kaj okazigos diskutojn ĉiam profitaj al Esperanto.

Anstataŭ timi la promesitan atombombon de IALA, mi persone tre deziras ĝin, kaj ju pli granda ĝi estos, des pli bone.

La biblioteko de Esperanto ĉiam kreskadas, kaj literatura lingvo neniam malaperas. Esperanto jam akiris senmortecon en la mondo per sia literaturo, kies unuaj paĝoj estis skribitaj antaŭ pli ol 60 jaroj kaj restas vivantaj. La belaj poemetoj, kiujn ni ĉiuj scias parkere, — *Mia Penso*, kaj *Ho! mia kor!* — estis skribitaj kelkajn jarojn antaŭ ol la apero de la "Unua Libro". "La Espero", "La Vojo",

BRAZILA INSTITUTO DE GEOGRAFIO KAJ STATISTIKO KAJ ESPERANTO

La Ĝenerala Kunsido de la Nacia Konsilantaro de Statistiko, unu el la du Fakoj de la "Brazila Instituto de Geografio kaj Statistiko", kunveninta dum la monato Julio nunjara, aprobis la jenan Rezolucion, kiu ricevis la numeron 273:

Konsiderante ke, en sia Rezolucio n.º 213, de la 5a de Aprilo lasta, la Centra Agantaro de la Konsilantaro esprimis, per varmaj vortoj, la ŝaton de l' Brazila Statistiko pro la nacia esperantista movado, kaj semtempe voĉojn pro la sukceso de la Deko Brazila Kongreso de Esperanto, organizita sub la aŭspicioj de la Instituto, laŭ iniciativo de Brazila Ligo Esperantista;

Konsiderante ke la Kongreso, kies celoj estis plene atingitaj, aprobis esprimplenan Rezolucion, en kiu ĝi eldiras, per honoraj vortoj, voĉon de laŭdo kaj danko al la Instituto, krom tri aliaj, per kiu ĝi esprimas sian interesecon rilatan al la kunagado pri aferoj interesantaj la Statistikon kaj Esperanto.

DECIDAS:

Par. Unua — La Ĝenerala Kunsido de la Nacia Konsilantaro de Statistiko elmontras siajn dankojn al Brazila Ligo Esperantista por la sukceso de la Deko Brazila Kongreso de Esperanto kaj laŭdas ties agadon por la esperantista movado, en Brazilo.

Par. Dua — Estu aneksitaj al tiu ĉi la Rezoluciojn aprobitajn de la Deko Brazila Kongreso de Esperanto, sub la numeroj 3, 17 kaj 19.

Par. Tria — Estas la Prezidanto de la Instituto rajtigita apliki la ri-

kiujn ni ĉiuj kantas, havas pli ol 40 jarojn de forta vivo kaj sano.

Ni iru trankvile nian helan vojon. Eĉ se dum jardekoj la mondo havos du paralelajn helplingvojn internaciajn, kiel ĝi estis regata samtempe de Demokratio kaj Faŝismo dum jardekoj, la fina venko apartenas al la plej honestaj, kiuj plej klare agis, ĉar nur tiuj akiras neŝanĉeblajn fundamentojn en la publika opinio. Ni agu ĉiam klare, honeste, kaj iru trankvile al nia celo. Neniu atombombo povos detrui noblan, homaman, paceman idealon, kiu al neniuj trudadas sian volon kaj al ĉiuj egale nur bonon deziras.

Ismael Gomes Braga

Esperanto ĉe Poŝto kaj Telegrafo

(Parolado farita de la Prezidanto de BLE okaze de la inaŭguro de la poŝta agentejo instalita en la sidejo de la Deka Brazila Kongreso de Esperanto).

ESTIMATAJ SINJOROJ, KARAJ GEKONGRESANOJ

La inaŭguro de tiu ĉi poŝta agentejo, instalita en la ejo de la Deka Brazila Kongreso de Esperanto, estas nova pruvo pri la granda simpatio, kiun de longe elmontradis al la internacia helplingvo Esperanto la brazila registaro. kaj tiu simpatio rilata al la Fako Telegrafo komenciĝis en la jaro 1906a, kiam D-ro Lauro Müller, tiam Ministro por Publikaj Laboroj, plenumante peton de Medeiros e Albuquerque, permesis la uzadon de tiu neŭtrala idiom, kiel klaran lingvon, ĉe la internaj telegramoj en Brazilo. Estis do nia lando la unua kiu ekuzis tiun lingvon en la telegrafa korespondado. Aliaj landoj, kiel Rusujo, Rumanujo kaj Anglujo sekvis tiun ekzemplon kaj nur post kelkaj jaroj, laŭ propono de la Ligo de Nacioj, la Internacia Poŝta Konvencio, kun sidejo en Berno, ĝeneraligis tiun uzadon. De tiam Esperanto figuris en la regularoj de ĉiuj landoj apartenantaj al tiu Konvencio.

En 1922 la Ministro por Publikaj Laboroj, laŭ peto de la "Internacia Ligo de Esperantista Poŝt-kaj Telegrafociclistaro", rekomendis al la direktoroj de l' Poŝto kaj de l' Telegrafo, ke ili sendu al la prezidanto de "Brazila Ligo Esperantista" liston de la nomoj kaj adresoj de ĉiuj oficistoj, kiuj jam scias Esperanton, ĝin lernas aŭ estas al ĝi simpatiaj.

En oktobro 1933a la Departemento de Poŝto kaj Telegrafo eldonis serion da 20 ilustritaj poŝtkartoj kun vortoj en la portugala lingvo kaj en Esperanto. Tiam nia Ligo faris, pere de esperantistaj gazetoj kaj "Internacia Esperanto-Ligo", kiu havas delegitojn en pli ol du mil lokoj, vastan propagandon de tiuj poŝtkartoj kaj organizis grandan kadron kun la kapoj de multaj dekoj da gazetoj kaj revuoj kiuj publikigis notojn kaj fotografa-

jojn de tiuj poŝtkartoj. Por doni ideon pri la graveco de tiu kadro, kiu nia Ligo donacis al la Poŝta Regiona Direktantaro, sufiĉas diri, ke ĝi estis tri metrojn larĝa kaj du metrojn alta.

Bazita sur la sukceso atingita de tiu eldono la tiam Ministro ordonis, ke estu uzata Esperanto en alia serio kun 39 poŝtkartoj, kiu aperis en februaro 1934a kaj havis grandan sukceson. Antaŭ Brazilo nur Hungarujo kaj Litvenŝtajo eldonis similajn poŝtkartojn. Baldaŭ tiuj serioj elĉerpigis kaj Brazila Ligo ne povis plenumi la multenombrajn petojn senditajn el pli ol 40 landoj.

En junio 1934a la Poŝto komencis la uzadon de stampilo kun vorto en Esperanto. Tiu fakto estas notinda, ĉar ĝi estas la unua fojo, kiam oni uzis la helplingvon por la propagando de turismo. En tiu sama jaro la poŝta agentejo funkciinta ĉe la ejo de la Internacia Specimena Foiro uzis poŝtan stampilon kun la jenaj vortoj: "Internacia Specimena Foiro. Rio-de-Janeiro. Brazilo."

Poste la Regiona Direktoro de Poŝto enmetigis ĉe la agentejon de la Havena Kajo plakon kun vortoj en diversaj lingvoj kaj en Esperanto.

En oktobro 1935a la Poŝto eldonis poŝtmarkon memorigantan la San Internacian Foiro de Rio de Janeiro, kun vortoj en la portugala kaj esperanta lingvoj. Sama poŝtmarko aperis en novembro 1936a okaze de la 9a Internacia Foiro.

En februaro de tiu ĉi jaro la Poŝto eldonis kartleterojn kun vidaĵoj de Rio de Janeiro kaj vortoj ankaŭ en Esperanto.

Kiel memorigo de la 9a Brazila Kongreso de Esperanto aperis bela poŝtmarko kun vortoj en Esperanto, prezentanta la standardojn de la nacioj, kie Esperanto estis pli disvastigita, kaj la verdan stelon ĉe la centro. Poste en la jaro 1937a, okaze de la Ora Jubileo de Esperanto, aperis nova memoriga poŝtmarko. Tiujn eldonojn ni ŝuldas al la tiam Ministro por Publikaj Laboroj, D-ro Marques dos Reis, kiu, kiel prezidanto de la Brazila Banko, monhelpis la nunan kongreson.

Brazila Ligo, rekte kaj pere de siaj membroj, dissendis pli ol kvin mil ekzemplerojn de ĉiu el la du poŝtmarkoj memorigantaj la Kongresojn de Esperanto.

La entuziasmo vekita de la eldono de la lasta estis tiel granda, ke la semajna gazeto "Heroldo de Esperanto", organo de la "Internacia Esperanto-Ligo" kaj eldonita en Germanujo, publikigis longan artikolon pri ĝi, el kiu ni elĉerpis la jenan pecon: "Niaj oficialaj sukcesoj plimultiĝas ĉiujare kaj ĝuste en la lastaj ni povas registri tutan serion de tiuj oficialaj sukcesoj. Sed tio, kio tute speciale entuziasmigas nin, estas la rekono de la brazila registaro per la eldono de speciala poŝtmarko por memorigi la Oran Jubileon de Esperanto. Ĝi valoras kiel oficiala venko, el kiu ni povas rajti fieri. Al la brazila registaro kaj precipe al sia progresema Ministro por Publikaj laboroj ni dankas el nia tuta animo pro ĝia nova atento al nia afero. Tiu Ministro ne faris apenaŭ diri kelkajn vortojn ĝentilajn, kiel tiujn, kiujn ni kutimas aŭdi de aliaj ministroj kaj eminentuloj, sed li kreis fakton: fakto, kiu parolas elokventan lingvon, eĉ al tiuj, kiuj ne volas kredi je la venko de Esperanto."

Nun ripetigis tiu fakto. Aperis ne unu, sed du poŝtmarkoj memorigantaj nian Dekan Kongreson. Unu el ili prezentas la portreton de nia kara rega Majstro, feliĉa verko de S-ro Leopoldo Campos. Ni ŝuldas la hodiaŭan okazaĵon al S-ro Generalo Mendonça Lima, Ministro por Publikaj Laboroj; al S-ro Subkolonelo Landry Sales, direktoro de la Departemento de Poŝto kaj Telegrafo, kaj al S-ro Majoro Zeno Zielinski, direktoro de la Ŝtata Monfarejo. Al ĉiuj la varmajn dankojn de la kongresanoj.

Krom la poŝtmarkoj ni havas ankaŭ memorigan stampilon, kiu multe kontribuos por disvastigi tra la mondo nian karan Esperanton.

Ekde la jaro 1937a estas uzata en unu el la poŝtagentejo en Rio de Janeiro speciala stampilo, unika en la tuta mondo, kun la vortoj en la portugala kaj esperanta lingvoj: "Rio de Janeiro. — Turisma urbo".

medojn, kiujn li juĝas konvenaj por la sukceso de la celoj elmontritaj en la Rezolucioj 17 kaj 19 menciitaj en la antaŭa paragrafo. (Sub. Alberto Martins — sekretario de l' Kunsido, D-ro

Mário Teixeira de Freitas — ĝenerala sekretario de la Instituto kaj Ambasadoro José Carlos de Macedo Soares — Prezidanto de la Instituto kaj de la Konsilantaro).

ALIĜU AL

**"BRAZILA LIGO
ESPERANTISTA"**

SERIO DE LA VENKO

Priskribo pri la poŝtmarkoj

LA POŝTMARKO DE LA SAŬDADO simboligas la honorigon de Brazilo al la milit-mortintoj kaj prezentas tombejan anguleton, kie, en la ombro de kasuarinoj, vidiĝas la kruco de tomo. Anĝelo ĵetas rozajn petalojn sur la tombŝtonon.

Unuafoje la vorto "Saŭdado" estas ensribita en poŝtmarkon, kaj tio igos ĝin, de nun, tutmonde konata.

LA POŝTMARKO DE LA GLORO estas honorigo de Brazilo al siaj batalantoj kaj prezentas soldaton de la Ekspedicia Trupo flankigita de la figuro de jumilino simbolicanta la "Gloron".

Por ne kripligi la tradician silueton de la brazila ekspedicianto, oni konservis la drapan ĉapon uzatan antaŭ la forveturo al la batalkampoj.

Sur dua plano, vidiĝas alegorio al la liberigo de la sklavigitaj popoloj, kiuj forpelas la jugon de la mankatenoj ligitaj de iliaj tiranoj, nun venkitaj por ĉiam.

LA POŝTMARKO DE LA VENKO prezentas alegorion al la popoloj, kiuj unuigis por mortmiliti la sangosoifantan faŝismon.

Ĝi konsistas el simboloj de la laboro, sciencoj kaj artoj. Ĝi havas sur la fono du alegoriajn figurojn ludantajn la trumpetojn de la "Venko".

La standardoj de la ĉefaj Unuigintaj Nacioj viciĝas sur la fono, kaj, inter la ceteraj, elreliefiĝas tiuj de Usono, Anglujo, Rusujo, Ĉinujo kaj Brazilo.

LA POŝTMARKO DE LA PACO konsistas el alegorio al la tempoj de trankvileco, paco kaj produktado, kiuj, fine, nun rekomencas por la homaro.

La elektita motivo estas prezentata de virina figuro kun frigia ĉapo, simbolicanta la demokration. La fono konsistas el kulturita kampo kaj peco de industria urbo.

Superregante la tuton vidiĝas ĉielarko, simbolicanta la trankvilecon, kiu sekvas la tempeston.

LA POŝTMARKO DE LA "KUNLABORADO" prezentas mondokarton, kiu ampleksas la tutan orientan marbordon de Usono kaj etendiĝas ĝis la ĉirkaŭaĵoj de la Suezia Kanalo kaj iras de la centro de Anglujo ĝis la koro de la afrika kontinento.

Sur tiu mapo vidiĝas la lokoj, el kiuj konsistis la nomata "Koridoro de la Venko", tiel trapasata de la aviadiloj de aliancanoj, ĉe la kunigo de elementoj necesaj al la batalo kontraŭ la nazi-faŝismaj fortoj, dum la decidaĵaj bataloj okazintaj, eke de la fino de 1941, en Afriko, en la sudo de Rusujo kaj por la defendo de Aŭstralio.

Gravurante tiun irvojon Brazilo markas la netakseblan "Kunlaboradon", kiun ĝi donis al siaj bravaj kunaliancanoj ĉe la lukto por la komuna afero.

Tiu kunlaborado estas simbolicata per la necesaj aerbazoj, lokitaj en Belém, Fortaleza kaj Natal, kiel ankaŭ per la sendado de la Brazila Ekspedicia Trupo al la batalkampoj, prezentata sur tiu ĉi poŝtmarko per ĝia ŝildo-distingilo.

La Departamento de Poŝto kaj Telegrafo eldonis specialan Folion enhavantan faksimilon de ĉiu el la kvin poŝtmarkoj el la Serio de la Venko kaj klarigan tekston pri la markoj en la portugala, angla, franca, itala, hispana, ĉina, rusa kaj Esperanta lingvoj. La supra fotografaĵo montras la tekston en Esperanto, kiun, laŭ peto de

Majoro Zeno Zielinski, direktoro de la Ŝtata Monfarejo, tradukis la Prezidanto de BLE. La ĉinan tradukon faris nia kara samideano Pastro J. P. Kao Setchien O. F. M., al kiu tiu direktoro donacis ekzempleron de la Folio enhavanta la tekstojn en ĉiuj lingvoj.

ORFOJ

(Popola kanto).

Kiu kantas korŝirante dum krepusko de l' vesper'? Estas l' orfoj, lacigitaj per laboro kaj sufer'.

Ili ankaŭ frumatene kantas kun amara ve', kaj eĉ nokte kant' ilia kortuŝanta tremas tre.

Ili sidas ĉirkaŭ fajro, kontraŭ frost' varmigas sin, manĝas panon tre malmolan, nur en akvon trempas ĝin.

Ili paŝtas ĉe l' arbaro la ĉevalojn de l' sinjor', siajn larmojn kaj ĉagrenon per la kanto pelas for.

El la latva lingvo

esperantigis F. V. Lorenz.

HELPO-FUNDO POR FAMILIO ZAMENHOF

Laŭ iniciativo de U. E. A., nia Ligo malfermis monoferan liston por kolekti monon por "Helpo-fundo por Familio Zamenhof." Baldaŭ tiu listo atingis la sumon de Cr\$ 1.567,40, kiun, bedaŭrinde, ni ne povis sendi al Svisujo, ĉar neniu Banko volis ĝin akcepti. Tial ni ĝin konservis por oportuna sendado post la mondmilito. Sube ni transskribas tiun liston, kiun ni publikigis en la jaro 1942:

	Cr\$
Brazila Ligo Esperantista, familio Gomes Braga kaj Maurício J. Magalhães, po Cr\$ 200,00	600,00
Esperanta Asocio de Rio Grande do Norte	164,00
A. Couto Fernandes kaj Grupo Esp. "Humberto de Campos" kaj "Montara Esperanto-Klubo", (kune), po Cr\$ 100,00 ..	200,00
Jaime Martins de Souza, "Pernambuka Esperanto-Asocio", "Esperanta Grupo de Bahia", Dr. Eusínio Lavigne, Boris Eston kaj du anonimuloj el Pelotas, kaj "Brazila Klubo Esperanto", po Cr\$ 50,00	300,00
Samideano	40,00
Manoel C. Pacheco (New Bedforde)	33,40
Grupo Esperantista de Limoeiro kaj M. M. Oliveira, po Cr\$ 30,00	60,00
Jechiel Kafensztok	25,00
Antônio José Vaz kaj Jaddo Couto Maciel, po Cr\$ 20,00	40,00
Ademar Senna, Hermes Pita, Vitor Miniero, S. A. Fidelulo, José Dartagnan kaj tri Anonimuloj po Cr\$ 10,00	80,00
Leonidas Silva, Ary Zamora, Donato Flores, Joaquim P. Correia kaj Sarah de Souza, po Cr\$ 5,00	25,00
Sumo	1.567,40
Procento	141,00
Generala sumo ...	1.708,40

Vortojn forigas la vento, Malnova proverbo diras. Sed viaj, dum eĉ momento, El nia kor' ne eliras.

(E. D. V.)

(El la tria Bulteno de Esperantista Klubo de Florianópolis).

ESPERANTO EN SVISUJO

La redakcio de "O Brasil Esperantista" ricevis de la prezidanto de la "Svisa Esperanto Societo" — Collège 140, Neuveville (I. B.) — la jenan leteron: "Estimataj gesamideanoj. Kvankam kun granda malfruigo, ni ĉiam plezure ricevas vian bonan gazeton, kaj kore dankas vin pro la regula sendado. La informoj pri la bonega kaj fruktodona laboro de vi farataj ĉiam ĝojigas nin. Ni ankaŭ bone laboras kaj prosperas. "Svisa Espero" daŭre aperis sed bedaŭrinde ni ne havis la eblecon ĝin forsendi al eksterlando, sed ni tre esperas ke baldaŭ ni ankaŭ povos ree sendi ĝin al vi regule. De post la fino de la milito en Eŭropo, la internaciaj poŝtaj rilatoj iom post iom pliboniĝas, sed verŝajne tamen pasos ankoraŭ tempo ĝis kiam ĉio estos denove en ordo.

La Svisa Esperanto-Kongreso plejsukcese okazis en Montreaux komence de Majo. Pro la invititaj rifuĝintoj, 9 nacioj estis reprezentataj.

Bonvolu noti la novan adreson de Svisa Esperanto-Societo.

Kun sinceraĵ samideanaj salutoj J. Gilliard. Prez de S. E. S."

ATESTOJ PRI LERNADO

Ricevis la Ateston pri Lernado la jenaj geesperantistoj: S-ro Arlindo Castor de Lima, el Natal, Rio Grande do Norte (A. E. R. G. N.); S-ro Armando Cambiaghi, S-ro Castorino Gomes de Carvalho, S-ro Francisco Demacq Rosas, S-ro Francisco Ângelo de Moura, S-ro Geraldo de Azevedo, S-ro Newton Ceratti, S-ro Zeferino Fernandes, F-ino Nair Alves Gama, S-ro José Ranzoni, F-ino Joaquina Ramos Prado, F-ino Maria Albertina Pereira Melo, S-ro Siegfried Joseph Schwach, S-ro Umberto Salomone, S-ro Naby Huluan, S-ino Maria Bergstron Lourenço Cavalheiro, S-ino Iracema Lopes Ribeiro, S-ro Vicente Cintra Porto, F-ino Elizabeth Wexlauer, S-ro Ervino Scicher, F-ino Dalva de Menezes Mell, S-ro Nicolino Brasil Vignati kaj F-ino Dulce Walder, geanoj do S. P. E. K., el São Paulo; S-ro Targino Soares, el Mossoró, Rio Grande do Norte; S-ino Matilde Simas, S-ro Bonifácio Pinto Leal, S-ro Valter Rodrigues, S-ro Álvaro Antunes, S-ro Francisco Doblás Filho, S-ro Celso Alves Rosa, S-ro Oscar Noronha Filho, S-ro José Gomes do Nascimento, S-ro Ary Ramos Barbosa da Silva, S-ro Amadeu do Carmo, S-ro Aryne da Costa Moraes Rego, F-ino Maria José Doblás, F-ino Ma-

SOCIETO DE GEOGRAFIO DE RIO DE JANEIRO

Praça da República, n.º 54

RIO DE JANEIRO — BRAZILIO

Taksado de la loĝantaro de Brazilo je la unua de Januaro 1945a. Antaŭkalkulo farita de la teknika kabineto de la Nacia Servo de homsumo (Brazilia Instituto de Geografio kaj Statistiko)

Fziografiaj regionoj	Federaciaj Unuiĝoj	Taksita loĝantaro je la unua de Januaro 1945a
NORDO	Teritorio Acre	1 637 800
	Amazonas	88 700
	Teritorio Rio Branco	463 900
	Pará	15 100
	Teritorio Amapá	1 017 200
	Teritorio Guaporé	25 600
NORDORIENTO	Maranhão	27 300
	Piauí	10 930 900
	Ceará	1 354 300
	Rio Grande do Norte	900 600
	Parafba	2 290 100
	Pernambuco	844 100
	Alagoas	1 561 400
	Teritorio Fernando Noronha	2 935 600
		1 043 600
		1 200
ORIENTO	Sergipe	17 169 200
	Bahia	595 000
	Minas Gerais	4 292 900
	Espírito Santo	7 458 400
	Rio de Janeiro	851 000
	Federacia Distrikto	2 030 200
		1 941 700
SUDO	São Paulo	14 193 400
	Teritorio Iguaçú	7 890 200
	Paraná	93 200
	Santa Catarina	1 316 100
	Rio Grande do Sul	1 242 800
CENTRA OKCIDENTO	Goiás	3 651 100
	Mato Grosso	1 368 700
	Teritorio Ponta Porã	907 800
		366 100
BRAZILIO		94 800
		45 300 000

NEKROLOGO

D-ro Venâncio da Silva

Brazilia Ligo Esperantista ĵus perdis unu el siaj plej kompetentaj membroj. Je la dek-unua de Septembro lasta, kun la aĝo de pli ol 80 jaroj, mortis D-ro Venâncio da Silva, emerita marmilita kuracisto, kaj ĝia Honora Vic-prezidanto. Li estas unu el ĝiaj fondintoj kaj Prezidinto de Brazilia Klubo "Esperanto". Fluanta oratoro, li faris paroladojn dum kelkaj brazilaj kongresoj de Esperanto, kiuj estis varme aplaŭditaj. Unu el ili, fa-

noela Doblás kaj F-ino Emília Castro, geanoj de A. E. R. J., de Rio de Janeiro; S-ro Dilermando Teixeira, el Belo Horizonte, Minas Gerais.

rita dum la 7a Kongreso, aperis en la Raporto publikigita de BLE.

Bone konante la anglan lingvon li tradukis Esperanten kaj eldonis la jenajn verkojn de Shakespear: "Parisina" kaj "Manfredo" kaj ankaŭ tradukis la verkon "Sieĝo de Korinto", kiun tamen li ne povis eldoni.

Al lia Familio niajn sincerajn kondolencojn.

HONÓRIO LEAL

Mortis ankaŭ Honório Leal, emerita ĉeftelegrafisto kaj kunfondinto de "Brazilia Klubo Esperanto" kaj de "Brazilia Ligo Esperantista". Li okupis la oficon de kasisto de tiu klubo dum ĝiaj unuaj jaroj. Li ĉeestis kelkajn brazilajn kongresojn de Esperanto. Tamen lasttempe li ne partoprenis la aktivecon de la Esperantomovado. Pacop al liaj cindroj.

BRAZILA KRONIKO

AMAZONAS. — *Manaus*. “Brazila Ligo Esperantista” donacis por la restarigo de la loka Biblioteko, kiu bruligis, kolekton da libroj en kaj pri Esperanto.

RIO GRANDE DO NORTE. — *Natal*. Kursoj de Esperanto funkcias ĉe la sidejo de “Esperanta Asocio de Rio Grande do Norte”. Interesa artikolo titolita “Leteroj el Havano” de S-ro Arlindo C. de Lima aperis en la revuo “Milho Verde” kaj alia de S-ro David Staree en la gazeto “A República”.

Mossoró. Ricevis la Ateston pri Lernado la malnova esperantisto S-ro Targino Soares.

Santa Cruz. Dum mallonga restado en tiu ĉi urbo S-ro Arlindo C. de Lima donis kelkajn lecionojn pri Esperanto ĉe la lernejo por laboristoj “São José”.

PARAÍBA. — *João Pessoa*. Aliĝis al BLE S-ro Arlindo Colaço, urbestro, al kiu ni ŝuldas la nomon de D-ro Zamenhof donitan al la komunuma biblioteko.

PERNAMBUCO. — *Recife*. Laŭ letero ricevita de F-ino Artemisa Vidal de Araújo, inaŭguriĝis la unuan de Septembro, ĉe la sidejo de Sindikato de la Komercofiscisto, kurso de Esperanto. Kiel propagandilon, la loka Klubo eldonis allogan afiŝon, kies kopioj estis vidataj dum multaj tagoj ĉe la montraj fenestroj de komercaj domoj. Desegnita la tekston F-ino Iracema Ferreira kaj fotografis la afiŝon S-ro Dário Rivas, novbakita esperantisto. Sur la sama paĝo ni aperigas ĝian fotografadon.

Estis reliefa okazaĵo ĉe la kultura vivo en Recife la inaŭguro de tiu kurso, aranĝita de la “Pernambuka Esperanto-Asocio”. Enskribiĝis en la kurson pli ol cent personoj, el kiuj instruistoj, kuracistoj, direktoroj de la sindikato kaj multaj sinjorinoj kaj fraŭlinoj. Malfermite la laborojn S-ro Simplício Luna, prezidanto de la Sindikato, elmontris ties plezuron cedi siajn instalaĵojn al “Pernambuka Esperanto Asocio” por la disvastigo de la utila interkomprenilo kreita de la genia Zamenhof. Li gratulis la ĉeestantojn pro ilia intereso por tiu internacia lingvo, kiu en la Mondo ĵus elirinta el terura milito, minacinta la bazojn de la civilizacio, estos sendube grandvalora, kiel ilo de ĝenerala reamikiĝo. Poste parolis D-ro Aguiñaldo Lins, prezidanto de la Asocio, kiu pritraktis pri la praktika utilo de Esperanto ĉe la internaciaj rilatoj kaj ĝia miregiga facileco. Tial la kurso

O INDICATO DO EMPREGADO NO COMÉRCIO DO RECIFE
 em colaboração com a
 ASSOCIAÇÃO PERNAMBUCANA
 ESPERANTO
 vai instalar em sua Sede
 um curso gratuito em 24 lições da
 LINGUA INTERNACIONAL AUXILIAR
ESPERANTO
 Culas de quarta e sábados
 Horário: de 19.30 h às 20.30 h
 Abertura do curso: 7 DE SETEMBRO DE 1945
 Matrículas abertas na Secretária
 do Sindicato

Fotografajo de la afiŝo anoncanta la kurson de Esperanto malfermitan de “Pernambuka Esperanto-Asocio” ĉe la sidejo de la “Sindikato de la Komercofiscistoj”.

tiam malfermata finiĝos post kelkaj semajnoj.

Fine parolis S-ro Lamartine Holanda, prezidanto de la Federacio de la Komercofiscistoj el Nordo kaj Nordoriento, kiu reliefigis la fratecan mision de Esperanto, la superan idealismon, kiu inspiris al Zamenhof ĝian kreadon kaj la entuziasman kaj noblan laboron de la esperantistoj, kiuj ne laciĝas por ĝia disvastigo.

Tiam S-ro Artur Veloso, gvidanto de 1^o kurso, parolis pri la strukturo de Esperanto elmontrante la logikon

kiu prezidis ĝian ellaboradon. Farante komparon inter Esperanto kaj la naciaj lingvoj, li reliefigis ĝian facilecon kaj klarecon.

La Januar-februara numero de la “Tutamerika Medicina Revuo”, kiun direktas D-ro Fernando Ribeiro de Moraes, publikigis en Esperanto la Konkludojn de la artikolo titolita “Kontribuo al la studo de la spinaco kaj de la genipo”, verkita de D-ro Dutra de Oliveira, el la Nacia Akademio de Medicino kaj libera docento ĉe la Medicina Fakultato en la Universitato de São Paulo.

BAHIA. — *Salvador*. D-ro Jaddo Couto Maciel daŭrigas siajn klopodojn por pligrandigi la nombron de siaj kunlaborantoj. Inter la 84 personoj el la ŝtato, kiuj aliĝis al la Deko Kongreso, estas D-ro Aristides Milton da Silveira, ĉefurbestro, al kiu la estraro de la loka Grupo intencas peti subvencion.

Jam aperis la dua numero de “Esperantista Bahiano”, kiu aperigis sur la unua paĝo de la kovrilo fotografadon de la publikigaĵoj memorigaj de la Deko Brazila Kongreso de Esperanto. Ĝi publikigas ilustritan artikolon pri la Deko kaj la tutan paroladon faritan de D-ro Leal da Costa, reprezentinto de la Ministro por Edukado ĉe ĝia ferma kunsido. Ĝi aperigis ankaŭ literaturaĵojn kaj ankaŭ biografion de la mortinta akademiano Francisco Xavier Marques, kiu naskiĝis en ŝtato Bahia. Niajn varmajn gratulojn al la “Esperanta Grupo de Bahia” kaj, speciale al nia sindona samideano D-ro Jaddo Couto Maciel.



Fotografajo de la personoj kiuj prezidis la malferman kunsidon de la kurso de Esperanto ĉe la sidejo de la Sindikato de la Komercofiscistoj en Recife. Maldekstre dekstren: S-ro Dário Rivas, F-ino Artemisa Vidal de Araújo, D-ro Aguiñaldo Lins, S-ro Simplício Luna, S-roj Lamartine Holanda, Moacir Cunha kaj Arthur Veloso da Silveira.



Grupo da gelnantoj de la kurso de Esperanto, direktata de S-ro Giovanni Faraco, Prezidanto de "Esperantista Klubo de Florianópolis".

Itanagé. Aliĝis al BLE S-ro Manoel Borges dos Santos, kies leteroj elmontras, ke li bone konas la helplingvon.

STATO RIO DE JANEIRO. — *Barra Mansa.* Laŭ iniciativo de F-ino Lacyr Schettino, kiu partoprenis nian Dekan Kongreson kiel kvara sekretario, fondiĝis "Esperanta Grupo de Barra Mansa", kies estraro estas la jena: Prez. — F-ino Lacyr Schettino, unua sek. — S-ro Obdego Augusto, dua sek. — D-ro José Maria Costa, unua kas. — S-ro Luis Vallejo, dua kas. — S-ro Sócrates Puntel, bibl. — S-ro Armando de Matos. La Kontrola Konsilantaro konsistas el S-roj René Nunes — prez. kaj Fernando Vilela de Andrade, S-ino Myrthes Aragão Silva kaj F-ino Dulce Guimarães — geanoj. Pere de kvin geanoj la Grupo aliĝis al niaj Ligoj. Funkcias kun granda sukceso, ĉe la sidejo de P Grupo (Av. Domingos Mariano, 176), kurso de Esperanto direktata de F-ino Lacyr Schettino. La tiea paroĥestro, Pastro Alberto, tre interesiĝas pri la internacia lingvo.

Nova Friburgo. Jezuito F. Carneiro, el la famkonata kolegio Anchieta, kiu estas religia ĉefinstruisto de la *Skolta Friburga Asocio*, tre interesiĝas pri Esperanto, kiun li ellernis, kaj intencas fari viglan propagandon ĉe la tiea skoltaro.

Campos. Ĉe la Evangelia Lernejo "Nina Arueira", sur strato Rocha Leão, 137, funkcias kurso de Esperanto, kiun loka gazeto anoncis.

SÃO PAULO. — *S. Paulo.* Jen estas la nuna estraro de "S. Paulo Es-

peranta Klubo", Prez. — S-ro Osvaldo Leite de Moraes, vicprez. — S-ro Geraldo de Azevedo, ĝen. sek. — S-ro Alcindo Brito, unua sek. — S-ro René Ventura Sales, dua sek. — S-ro Francisco Demacq Rosas, unua kas. — S-ro Armando Cambiagli, dua kas. — D-ino Azália Machado Dias, bibl. — F-ino Amélia Levy kaj Dir. de Propagando — S-ro José Reganatti. Estas akklamita Honora Direktoro kaj bonfarinta Ano S-ro Ambadoro José Carlos de Macedo Soares.

La novaj Statutoj de la Klubo estas aprobitaj la 19an de Majo lasta kaj ĝia oficiala registro la 19an de Junio. Estas konsiderataj fondintoj la 49 geanoj aliĝintaj antaŭ tiu ĉi dato. Je la 15a de Junio sep gelnintoj kaj je la 21a de Julio dekkvin estas aprobitaj kaj ricevis la Ateston pri Lernado. Prezidis la ekzamenojn S-ro Osvaldo Leite de Moraes kaj oficis, respektive, kiel ekzameninto kaj sekretario S-ro René Ventura Sales kaj D-ino Azália Machado Dias. Daŭras plu la supera kurso direktata de S-ro Osvaldo de Moraes kaj nova supera kurso malfermiĝis, sub la direkto de S-ro René Ventura Sales. Malfermiĝis ankaŭ du novaj elementaj kursoj, kiuj funkcias ĉe la sidejo de la "Teozofia Societo" sub la direkto de D-ro Geraldo Azevedo kaj D-ino Azália M. Dias. En la unuan enskribiĝis 54 gelnantoj kaj en la duan pli ol cent. Ĉe iliaj inaŭguroj paroladis S-ro Osvaldo de Moraes.

Estas rimarkinda la fakto, ke ĵus aliĝis al niaj Ligoj 28 geanoj de la Klubo. Vojaĝis al Rio Grande do Sul.

kie li restis tri monatojn, nia fervora samideano D-ro Tito de Barros Júnior, kiun la prezidanto de BLE havis la plezuron koni dum vizito, kiun li faris al nia sidejo.

"Arcádia", revuo de la Literatura Akademio de la Jura Fakultato ĉe la Universitato de S. Paulo, kies prezidanto estas nia samideano D-ro Genésio Pereira Filho, aperigis sciigojn pri la Dekaj kaj ties publikigaĵoj kaj la portreton de Zamenhof.

Aliĝis al niaj Ligoj kiel MS D-ro Nicolau Falci.

Santos. S-ro Maurício Foschi prezentis al la estraro de G. E. F. V. L. raporton pri sia vizito al la Esperanta Grupo de Curitiba. S-ro L. B. Nogueira da Cruz, ĝen. sek. de C. E. S., kaj lerneja inspektoro, disdonis al la lokaj lernejoj ekzemplerojn de la publikigaĵoj aperintaj dum la Dekaj, kiujn sendis al li la estraro de BLE. Funkcias kursoj de Esperanto ĉe la sidejoj de la du lokaj grupoj.

Rio Claro. S-ro Elidio Taveiros sciigis la prezidanton de BLE, ke je la unua de Septembro lasta fondiĝis Esperanta Klubo "Ismael Gomes Braga", kiu celas disvastigi la konon de Esperanto kaj eksciti la aktivecon por la idealo de internacia lingvo, kiel ilo de kunfratiĝo de la popoloj kaj de la rasoj. Jen ĝia sidejo: Colégio Estadual. Al la nova kunbatalanto BLE deziras, ke ĝia entuziasmo ne estu maldaŭra, ĉar ĝia nomo donas al ĝi grandan respondecon.

PARANÁ. — *Curitiba.* "Colégio Estadual do Paraná", organo de la studentoj de la gimnaziaj kaj kolegiaj kursoj, publikigis sur la unua paĝo gravan artikolon pri Esperanto, kiu finiĝas per alvoko al siaj legantoj, ke ili enskribiĝu en la kurson, kiu funkcias ĉiudimanĉe sub la direkto de S-ro Augusto Gonçalves de Castro, prez. de la loka grupo.

SANTA CATARINA. — *Florianópolis.* Viglaj kaj impresigaj estas la iasttempaj laboroj de "Esperantista Klubo de Florianópolis", kies prezidanto, S-ro Giovanni Faraco, meritas varmajn kaj entuziasmajn gratulojn de la brazila Esperantistaro. Krom la organizo de diversspecaj studoj kaj kunsidoj, tiu Klubo subtenas bone vizitatan kurson de Esperanto, sub la direktado de ĝia prezidanto. La apuda fotografaĵo montras grupon da gelnantoj dum unu el la lecionoj. En tiu kurso partoprenas sep statistikaj oficistoj, kiuj ricevis de S-ro Lourival Câmara, direktoro de la Departemento, permeson, por ke ili ĉeestu la lecionojn dum la laborhoroj.

Estas interese atentigi pri la bonega harmonio ekzistanta inter statistikoj kaj esperantistoj. Antaŭ nelonge D-ro Lourival Câmara decidis, ke de ĉiuj publikigaĵoj eldonitaj de la Departamento aperu resumo en Esperanto, flanke de tiuj en la franca kaj angla lingvoj. Ankaŭ la Regiona Kunagantaro de la nacia Konsilantaro de Statistiko, kies prezidanto estas S-ro Lourival Câmara, aprobis rezolucion laŭdantan la aktivecon de la loka esperantista klubo. Varman dankon al tiu Departementestro, kies ekzemplo meritus esti imitata.

Je la 18a de Aŭgusto, ĉe la salono de tiu Departemento, okazis interesa kunsido de la Klubo, kiu konsistis el Literatura Horo, Porlegema Rondo kaj Grupludo. Tiam raportis pri legitaj libroj S-roj G. Faraco, Ari Kar-der Melo, Gilberto Doin Vieira kaj Osvaldo Melo Filho. La klubo starigis konkurson por la plej bona korekto de elektita frazo. Ricevis la premiojn F-inoj Maria do Carmo Gevaerd kaj Vitória Speck. Ĉe la grupludo estis premiita S-ro Ari Melo. Ĉe la literatura Horo partoprenis F-ino Maria do Carmo Gevaerd kaj S-roj Almir José Rosa kaj Oswaldo Melo Filho.

S-ro G. Farauo vizitis Lian Moŝton Dom Joaquim Domingues de Oliveira, al kiu li donacis kelkajn publikigaĵojn de la Kongreso.

"A Gazeta" publikigis interesan raporton pri la aktiveco de la loka klubo, alian speciale pri la nomita kunsido kaj artikolon titolitan "La Statiska Departamento kaj Esperanto". Ankaŭ "O Idealista", oficiala organo de la Kultura Asocio "Instruistino Antonieta de Barros", el la Edukada Instituto, en sia tria numero, publikigis artikolojn de ĝiaj lernantoj G. Doin Vieira kaj Hélio J. Alves. Ili pritraktas pri la utileco kaj celo de Esperanto kaj ties movado.

RIO GRANDE DO SUL. — *Pôrto Alegre.* La "Kurso de Esperanto Zamenhof" ŝanĝis sian nomon je "Esperanto-Grupo Zamenhof", kies adreso estas: Rua General Vitorino, 145.

Kelkaj tieaj esperantistoj kunsidis kaj fondis novan grupon, kiu ricevis la nomon "Sociedade Esperantista Sul-Brasileira", Jen ĝia estraro: Prez. — S-ro Ary Zamora, sek. — S-ro Boris Eston kaj kas. — S-ro Aloys Furtenbach. Ilin anstataŭos S-roj Lisipo José Rodrigues, Majoro Francisco Pereira da Costa kaj Jônatas de Campos Júnior. En ĝia sidejo (Rua dos Andradas, 1737) funkcias kurso direktata de S-roj Boris Eston kaj Ary Zamora. Al ĝi, kiu decidis

aliĝi al BLE, ni deziras bonan sukceson.

MINAS GERAIS. — *Belo Horizonte.* La "Esperanto-Klubo Azeredo Continho" jam aprobis sian regularon kaj kunvenas ĉiumarde ĉe la Centra Direktantaro de Studentoj. Funkcias kursoj de Esperanto ĉe la Blindula Societo "Luis Braille", ĉe spiritisma societo kaj ĉe protestanta eklezio, di-

rektataj, respektive, de S-roj Wilson Veado, Luis Anacleto Silos kaj Dilermando Teixeira. Pri la unua kurso, inaŭgurita la 13an de Aŭgusto, S-ro Wilson Veado publikigis artikolon sur la kolonoj de "Diário da Tarde". Li ricevis gratulan leteron de la malnova esperantisto S-ro Francisco de Almeida, profesoro ĉe la Instituto Benjamin Constant kaj profesoro aprobita de Esperanto. S-ro Almeida promesis sendi al S-ro W. Veado esperantan gramatikon de li verkita laŭ la Brajla sistemo.

Artikoloj kaj notoj pri Esperanto aperis en la Gazetoj "Minas Gerais" "Folha de Minas" kaj "O Estado de Minas".

RIO DE JANEIRO. — Brazila Klubo "Esperanto", fondita en la jaro 1906a, en sia lasta ĝenerala kunsido, aklamis sia Honora Prezidanto D-ro Mário Teixeira de Freitas, ĝeneralan sekretarion de la "Brazila Instituto de Geografio kaj Statistiko" kaj prezidanton de la "Inter-Amerika Instituto de Statistiko", pro liaj tro valoraj servoj faritaj al Esperanto dum multaj jaroj. Honoron al la merito!

Plensukcese funkcias en ĝia sidejo la elementa kurso, kiun malfermis je la 16a de Junio F-ino Maria do Amaral Malheiro, ĝenerala sekretario. Ĝia bibliotekisto, F-ino Débora do Amaral Malheiro, helpata de sindonaj geanoj, reorganizas ĝian tre valoran bibliotekon. Donacoj de mono kaj libroj por la akiro de novaj libroj kaj bindado de malnovaj jam estas ricevitaĵoj.

La "Associação Esperantista do Rio de Janeiro", kiun prezidas S-ro Délio Pereira de Souza, vige laboras per ĉiuj rimedoj por propagandi Esperanton. Ĉar ankoraŭ ne estis al ĝi eble lui salonon ĉe la urba centro, ĝiaj geanoj kunvenas ĉiun sabaton vespere ĉe la sidejo de la Bonfarinta Kaso de la Civila Gvardio. En la aliaj tagoj ili kunvenas kiel antaŭe. Je la 22a de Septembro okazis elektado de la membroj de l' Kontrola Konsilantaro, kiu konsistas el la jenaj geanoj: S-roj Jozefo Joels, Antônio Alípio Reis, Manoel Joaquim Pereira, Antônio Caetano Coutinho kaj Aldino de Freitas. 14 asocioj ricevis la Ateston pri Lernado. S-ro Francisco Doblaz Filho finis sian elementan kurson kaj malfermis alian en *Vicente de Carvalho*. S-ro José Gomes Braga malfermis elementan kurson en la sidejo de la Asocio kaj S-ro Délio Pereira de Souza perfektigis kurson en *Penha*, en kiun enskribigis kelkaj instruistoj.

TIPOJ KAJ ASPEKTOJ

DE BRAZILIO

Originaloj el la

"Brazila Revuo de Geografio"

Tradukitaj de membroj de "Brazila Ligo Esperantista"



Speciala presado memoriga de la

DEKA BRAZILA KONGRESO DE ESPERANTO

Okazinta en Rio de Janeiro de la 14a ĝis 22a de aprilo de 1945

NACIA KONSILANTARO DE GEOGRAFIO

1945

TIPOJ KAJ ASPEKTOJ DE BRAZILIO. Originaloj el la "Brazila Revuo de Geografio" tradukitaj de sep membroj de "Brazila Ligo Esperantista". Speciala presado memoriga de la *Deka Brazila Kongreso de Esperanto*, okazinta en Rio de Janeiro, de la 14a ĝis la 22a de aprilo de 1945. Eldonita de la "Brazila Instituto de Geografio kaj Statistiko." Formato 27 x 19. Ĝi enhavas 152 paĝojn kaj 36 ilustraĵojn. Presejo de la Instituto.

Ĉiu, kiu deziras rivevi ĝin bonvolu skribi al BRAZILA LIGO ESPERANTISTA Praça da República, 54. Rio de Janeiro, Brazilo, aldonante al sia peto tri respondkuponojn por la poŝto.

QUE É O ESPERANTO?

Publicação Comemorativa do 10.º Congresso Brasileiro de Esperanto, organizado pela Liga Esperantista Brasileira e gentilmente impressa pelo Serviço Gráfico do Instituto Brasileiro de Geografia e Estatística.

Distribuição gratuita.

Oni inaŭguris la portreton de Carlo Bourlet apud la Biblioteko de la Asocio, kiu havas la nomon de tiu granda batalinto por Esperanto.

Kunvenoj de "Viva Gazeto", direktataj de S-ro Nelson de Souza, kaj de "Socia Vespere" kaj promenadoj al Silvestre, Cascatinha kaj Itacurussá okazis dum la tria jarkvarono lasta. Je la 21a de Julio, 38a datreveno de la fondo de *Brazila Ligo Esperantista*, aro da asocioj vizitis ties sidejon. Faris salutan paroladeton kaj oferis al ĝia prezidanto, S-ro A. Couto Fernandes, korbon da naturaj floroj S-ro Otaviano da Silva Lopes.

El la Raporto prezentita de la Prezidanto de la "Brazila Spiritisma Federacio" al la Ĝenerala Kunsido ni elĉerpis la jenon: "Dum la socia jaro, kiu finiĝis je la 30a de junio lasta estis facile rimarkebla pilgrandiĝo ĉe la fako Esperanto. Finiĝis la unua parto de la plano ellaborita, komencita en la jaro 1937a, tio estas, la propagando de Esperanto inter la spiritistoj, kaj komenciĝis nova fazo, kiu konsistas el la eldonado de libroj por la disvastiĝo de Spiritismo ĉe la tutmonda esperantistaro. Jam aperis du libroj, nome: "Voĉoj de Poetoj el la Spirita Mondo" kaj "Preglibro por Spiritoj". Por montri la valoron de la disvendado de esperantaj libroj en kaj pri Esperanto pere de la Librejo de la Federacio sufiĉas diri, ke dum la menciita socia jaro vendiĝis ĉirkaŭ 6.000 ekzempleroj da ili, el kiuj 2.046 de "Esperanto sem Mestre" (Dua eldono) kaj 900 "Guias de Conversação".

Pro malsano de S-ro Onésimo Faria direktas la kurson funkciantan ĉe la sidejo de la Federacio S-ro Haroldo Leite Pinto.

Komence de Julio malfermiĝis novaj kursoj de Esperanto, direktataj de S-ro Roberto das Neves, ĉe la sidejo de la Esperanto-Klubo de la Kristana Asocio de Junuloj, kie okazas ĉiuvenrede, je la 18.30, kunvenoj de ĝiaj anoj, dum kiuj, nur parolante Esperanton, oni diskutas ĝeneralajn problemojn, legas kaj komentarias leterojn ricevitaĵajn kaj sendotajn kaj faras paroladojn. Je la 20a de Julio okazis parolado pri "Esperanto kaj la Homa Frateco" farita de Prof. João B. de Melo e Souza.

Vizitis la sidejon de BLE S-roj D-ro Benjamin Camozato, D-ro Luiz de Azeredo Coutinho, Armindo Vaz Pereira da Silva, José Vaz Pereira da Silva, kiu transdonis al la Prezidanto salutan leteron de la estraro de Grupo Esperantista "F. V. Lorenz", S-ro

Tito de Barros Junior, S-ro Edward Bilski Bright, S-ro Antonio Vila, argentina esperantisto kaj S-ro Vitor Mignero.

Notoj pri Esperanto aperis en "Jornal do Comércio", "Diário de Notícias", "Vanguarda", "O Globo" kaj aliaj. "Correio da Manhã", en sia fako "Cortes e Recortes", publikigis artikolojn pri lingvaj aferoj. "Folha Carioca" aperigis artikolon pri "La Misio de Esperanto, kiel Faktoro de Unuiĝo inter la Popoloj" kaj la mesaĝon senditan de la Inter-Amerika Instituto al la Ambasadoro José Carlos de Macedo Soares; "Gazeta de Farmácia" du interesajn artikolojn verkitajn de S-ro A. Caetano Coutinho, "Juventude Unida" artikolon pri la Kongreso kaj poezion de Murilo Araújo pri Esperanto kaj "Revista Taquigráfica" artikolon de S-ro Plátao Martins titolitan "Lernu Esperanton". "O Reformador" kiel okazas en ĉiu numero, aperigis notojn pri Esperanto kaj artikolojn, precipe de S-ro Ismael Gomes Braga.

KORESPONDADO

Gekorespondantoj kun F-ino Helena de Groot, en Bergen, skribu al S-ro Gaston Véron — 19 rue Gougeard — Le Mans — Sarthe. Francujo.

"Argentina Esperantista Katolika Asocio", Bartolomeu Mitre 1524, Buenos Aires, Argentino, havas 60 lernantojn en Esperanta kurso. Ili interŝanĝas gazetojn kaj korespondas pri kulturaj temoj.

S-ro M. Eng. Diendegard, 5 rue de Bapeaume, Maromme (S. Inf.), Francujo, deziras korespondantojn por la lernantoj de sia Esp. kurso.

PREGLIBRO POR SPIRITISTOJ, de Allan Kardec. El la franca lingvo tradukis I. G. B. 80a libro eldonita de la "Livraria da Federação E. Brasileira. Jen la PRAVIGO de la tradukinto:

Niaj katolikaj samideanoj havas la bonegajn preĝarojn de Radegonde, Beaufront kaj Caroli kaj aliajn religiajn librojn en Esperanto presitajn en Eŭropo, gravan tutmondan asocion — IKUE —, la gazeton "Espero Katolika", kaj ek de 1905 ili faras diservojn en Esperanto. En Nederlando estas la gazeto "Nederlanda Katoliko" kaj la asocio "Mondjunularo Katolika". En Argentino, estas brila katolika predikanto en Esperanto, Lia Pastra Moŝto Johano Ortega, S. J., kiu pere de la "Asociación Esperantista Católica Argentina", brave uzadas nian lingvon por la plej noblaj religiaĵoj.

Niaj kristanaj (= protestantaj) samideanoj havas la ĉarmán "Himnaron Espe-

INTERNACIA ESPERANTO-LIGO

Brazilaj Membroj de IEL dum la jaroj 1943, 1944 kaj 1945 (Ĝis Septembro)

	1943	1944	1945
AM	95	163	240
MJ	39	69	88
MA	25	28	53
MS	6	5	8
Sumo	165	265	389

Pagintaj Membroj de IEL je la 31a de Decembro

	1943	1944
1. Britujo	2492	2699
2. Svedujo	1336	1133
3. Usono	269	283
4. Brazilo	165	265
5. Aŭstralio	165	185
6. Svisujo	152	268
7. Portugalujo	72	67
8. Novzelando	62	183
9. Argentino	34	49
10. Palestino	32	42
11. Kanado	13	17
12. Egiptujo	12	15
13. Maroko	10	53
14. Urugvajo	5	9
15. Sudafriko	5	7
16. Irlando	4	21
17. Islando	3	56
Aliaj landoj	28	43
	4859	5386

36 landoj en 1943 kaj 39 landoj en 1944.

rantan", de Montagu C. Butler, "La Sanktan Biblion", gazeton kaj multe da libroj gravaj en la lingvo internacia por religiaĵoj celoj.

Teozofoj kaj bahaistoj ankaŭ havas literaturon en Esperanto.

La spiritistoj ĝis nun nenian literaturon posedis en la lingvo de la universala frateco; tial ni ĵus eldonis la libreton "Voĉoj de Poetoj el la Spirita Mondo", kiu estas la unua doktrina verko aperinta en Esperanto pri Spiritismo; nun ni prezentas tradukon de la preĝaro de Allan Kardec, kaj espereble aliaj pli gravaj libroj sekvos tiujn unuajn provojn, se tia estos la volo de Dio.

D-ro Lazaro Ludoviko Zamenhof estis la unua esperantisto, kiu publike alparolis DION en nia lingvo, en la Bulonja Kongreso, en 1905, per la bela "Preĝo sub la verda Standardo", donante al ni la plej bonan ekzemplon de la enkonduko de Esperanto en la religion: tial ni respektplene dediĉas al lia granda Spirito itun ĉi humilajn eldonon, okaze de la 85a datreveno de lia naskiĝo. — 15. XII. 1944.

BIBLIOGRAFIO

LA TROVITA FELIÇO

Tibor Sekelj — Eldonis "Progreso". Buenos Aires 1945. Havebla en Argentino ĉe Asocio Esperantista de Buenos Aires. Calle Castelli 265 prezo m/n \$0.40; en Brazilo ĉe Brazila Ligo Esperantista aŭ Livraria da Federação E. Brasileira prezo Cr\$ 3,00.

Laŭ mia scio, "La Trovita Feliço" estas la unua libro originale verkita en Esperanto kaj eldonita en Argentino, sekve ĝi okupas gravan lokon en la tempo; kaj tempo neniam revenas. Dum la tuta eterneco la libreto okupos tiun lokon!

La Aŭtoro estas brila verkisto, profesia ĵurnalisto, talenta rakontisto kaj fande posedas la lingvon. Tamen, li modeste prezentas sian libreton kvazaŭ estus nur aldono al lernolibro, ĉar post la titolo li presigis la vortojn "Novelo legebla por kursfinintoj"; sed ĝi interesas kvaroble eĉ la plej seriozajn pensulojn: 1-e) Ĝi estas lerte verkita helteristikajo; 2-e) Grava metafizika problemoj; 3-e) Psikologia solvo de la demando pri neŝancebla feliço; 4-e) Konfirmo de religia dogmo pri la eterneco de la vivo.

Plej mirinde estas, ke li prezentas tion gravan verkon sur dudek malgrandaj paĝoj. Kiu vi legas dum tridek minutoj, kvankam poste vi devos pripensi dum kvardek jaroj!

Ni gratulas niajn argentinajn samidanojn pro la apero de la unua verko originale — se ni ne eraras — skribita kaj presita en Esperanto en la progresema najbara Respubliko.

SKOLTISMO KAJ ESPERANTO

La venonta Mond-Jamboreo okazos en Francujo en Aŭgusto 1947. Esperanto estos unu el la lingvoj uzataj, kaj ĉiuj prospective kaj programoj estos tradukataj en Esperanton. Kunveno por la Esperantistoj estas antaŭvidita la duan tagon. Skoltoj lernigu Esperanton ĉirkaŭ vi, kaj kontaktu viajn organizaĵojn por ke ili ankaŭ tion faru.

(El "Esperanto Internacia". Julio-Aŭgusto 1945).

ESPERANTO EN PORTUGALUJO


En Barreiro okazis en Aprilo la dua ĉatreno de la fondo de Esperanta Rondo "La Vekiĝo." Partoprenis ankaŭ la rondoj "La Teranoj", "Verda Stelo" kaj "La Lumo", el Tramagal, kun la respektivaj standardoj: "La Pioniroj", el Amadora; "Oazo", "Troço" kaj "Helpo", el Lisboa; kaj "Montijana Esperantamiko", el Montijo. La aranĝo tre bone sukcesis kaj entuziasmigis ĉiujn ĉeestantojn.

(El "Esperanto Internacia" — Julio-Aŭgusto 1945).

EKSTERLANDAJ GAZETOJ ESPERANTISTAJ

Krom la eksterlandaj gazetoj esperantistaj menciitaj en nia antaŭa numero, ni ricevis la jenajn:

FLANDRA ESPERANTISTO — Orga-



QUE É O ESPERANTO? Tiu ĉi 64paĝa propaganda broŝuro, en portugala kaj esperanta lingvoj, estas aranĝita de Prof. J.B. de Melo e Sousa, ĝen. sek. de BLE, kaj eldonita de tiu Instituto, kiel memoraĵo de la Deko Kongreso. Senpage dissendata al ĉiuj esperantistaj grupoj kaj al ĉiu, kiu deziras fari propagandon de Esperanto. krom informoj pri la simpleco, facileco kaj oportuneco de Esperanto, ĝi enhavas kelkajn poeziaĵojn, inkluzive 20 kvarversajojn de la brazila poeto Ademar Tavares kun ĝiaj respondaj tradukoj en Esperanto.

O ESPERANTO NO BRASIL. 26-paĝa broŝuro en portugala lingvo por la propagando de Esperanto en Brazilo. Ĝi konsistas el informo sendita de D-ro Mário A. Teixeira de Freitas, ĝenerala sekretario de la "Brazila Instituto de Geografio kaj Statistiko", al la Ministerio por Edukado, por plenumi peton venintan per diplomaciaj vojoj el Kubo. La broŝuron eldonis la Instituto kaj presis ties presejo. Senpage disdonata.

no de "Flandra Esperanto-Instituto V. z. W." Julio 1945. Red. kaj Adm.: Pieter van Humbekstraat 3, Brussel-West, Nederland.

COMPRENDRE — Cercele Espérantiste Universitaire. April-junio 1945. Sidejo: Lycée Ampère, 31. Rue de la Bourse. Lyon, Francujo.

DANSK ESPERANTO-BLAD. Eldonata de "Centra Esperantista Ligo". Julio 1945. Red. E. Windebalde. Aalokkehaven 24. Odense. Danujo.

BRAZILA LIGO ESPERANTISTA
(Liga Esperantista Brasileira)

DIRETORIA

Presidente perpétuo — Eng. Alberto Couto Fernandes.

Vice-presidente — Dr. Carlos Guimarães Domingues.

Secretário geral — Prof. João B. de Mello e Souza.

1.º Secretário — Dr. Mário Ritter Nunes.

2.º Secretário — Senhorita Iraní Baggi de Araujo.

Tesoureiro — Sr. Odilo Pinto.

LIGA ESPERANTISTA BRASILEIRA

Aderiram nos meses de Junho a Setembro do corrente ano à LIGA ESPERANTISTA BRASILEIRA e, portanto, à INTERNACIA ESPERANTO-LIGO, as seguintes pessoas:

Como MS: Dr. Nicolau Falci, do Estado de São Paulo.

Como MA: Sr. Pedro Rinkevicius, de São Paulo; e Dr. José de Arimatéa Pinto do Carmo, do B. K. E., do Rio de Janeiro.

Como AM: Sta. Yolanda de Araújo Costa, Sr. Joaquim Mendes da Rocha, do Rio de Janeiro; Sr. Ary Barbosa da Silva, Sr. Joaquim Antônio Cabral, Sr. Lauro Alexandrino Chaves, Sr. Mário dos Santos Abrantes, D. Manoela Doblaz, D. Matilde Gonçalves Simas, Sr. Milton Martins dos Santos, Sr. Osvaldo de Carvalho, Sr. Oton Crespo Nunes, Sr. Raimundo de Oliveira Coimbra, Sr. Valter Rodrigues, da A. E. R. J., Sta. Lacyr Schettino, Sta. Elisa Schettino, Sta. Myrthes Ciragão Silva, Sr. Luiz Vallejo e Sr. René Nunes, do E. G. B. M., de Barra Mansa, Estado do Rio; Sr. Arlindo Colago, de Alagoa Nova, Estado da Paraíba; Sr. Genésio Pereira Filho, Sta. Genny Ceratti, Sta. Daicyr Salviati, Sta. Elvimerá Tosi, Sr. Aluísio M. de Barros, Sr. Nicolau Suzano, Sr. Jacquelin R. G. Sanchez, D. Mathilde Zaidan Rosas, Sta. Nair Alves Gama, Sta. Maria Bergstron Lourenço Cavalheiro, Sr. Américo Andrade, Maria Albertina Pereira Melo, Sr. Ervino Scicher, Sr. Gustavo Campos, Sta. Maria Elizabeth F. Ozono, Sr. Nicolau Brasil Vignati, Sr. Walter Plaza, Sr. Fernando Alves Simões, Sr. Tuffy Resec Choueri, Sr. Paulo Amorim Cardoso, Sta. Wolfgang Baraldi, Sr. Alcides R. Boschini Traldi, Sr. Gilberto Marchetti Machado, Dr. Cesário E. Tavares, Sr. Antônio Palermo, Sr. Nelson Salviati, Sr. Adhemar Martinez e Sr. Siegfried Josef Schwach, do S. P. E. K., de São Paulo; Sr. Ary Sanhudo e Sr. Agripino Viana, de Porto Alegre, Rio Grande do Sul; Sr. Thelesphoro Nogueira Chagas, Sr. José Pacheco e Sr. Waltencyr Cataldi do Couto, de Juiz de Fôra, Minas Gerais.

LIVROS EM E SOBRE ESPERANTO
PODEM SER ADQUIRIDOS NA
LIGA ESPERANTISTA BRASILEIRA

e nas seguintes livrarias:

Francisco Alves—Rua do Ouvidor, 166
Livraria da Boa Imprensa, Rua da Assembléia, 35.

Livraria da Federação E. Brasileira — Avenida Passos, 30.

PEÇAM CATÁLOGO

Grupoj Aliĝintaj al B. L. E.

- BRAZILA KLUBO "ESPERANTO".**
(1906). Sidejo: *Praça da República*, 54. *Rio de Janeiro*. Tel: 42-4357.
- CENTRO ESPERANTISTA DE SANTOS** (1931). Sidejo: *Rua Paraguai*, 150. *Santos*. Est. *São Paulo*.
- ESPERANTA GRUPO DE BAHIA.**
(1936). Sidejo: *Rua Bangala*, 18. *Salvador*. *Bahia*.
- S. PAŬLO ESPERANTA KLUBO.**
(1937). Sidejo. *Rua Alabastro*, 462. — *São Paulo*. Estado *S. Paulo*.
- PERNAMBUKA ESPERANTO-ASOCIO.** (1937). Sidejo. *Rua Gomes Coutinho*, 318. *Recife*. *Pernambuco*.
- ESPERANTA ASOCIO DE RIO-Grande-DO-NORTE.** (1940). Sidejo: *Rua Borburema*, 1.032. *Natal*. *Rio Grande do Norte*.
- GRUPO ESPERANTISTA DE LIMOEIRO DO NORTE.** (1940). Adreso: *Caixa postal*, 73. *Limoeiro do Norte*. *Ceará*.
- CENTRO ESPERANTISTA DE JUIZ DE FORA.** (1940). *Rua Santo Antônio*, 110. *Sob. Juiz de Fora*. *Minas Gerais*.
- CENTRO ESPERANTISTA GRANBERYENSE.** (1940). *Instituto Granbery*. *Juiz de Fora*. *Minas Gerais*.
- GRUPO ESPERANTISTA "FRANCISCO VALDOMIRO LORENZ".** (1940). *Caixa postal*, 777. *Rua Henrique Porchat*, 4. *Santos*. *E. de São Paulo*.
- ESPERANTO RONDETO DE TORQUATO SEVERO.** (1941). Sidejo: *Vila Torquato Severo* (*D. Pedrito*). *Rio Grande do Sul*.
- ASSOCIAÇÃO ESPERANTISTA DO RIO DE JANEIRO.** (1942). *Rua Arquias Cordeiro*, 295-sob. *Meyer*. *Postkesto* 3677. *Rio-de-Janeiro*. *Telefone*, 29-4581.
- ESPERANTISTA KLUBO DE FLORIANÓPOLIS.** (1943). *Rua Álvaro de Carvalho*, 59. *Florianópolis*. *Santa Catarina*.
- PETROPOLISA ESPERANTA GRUPO.** (1944). *Avenida 15 de Novembro*, 1.005. *Petrópolis*. Est. do *Rio*.
- CLUBE ESPERANTISTA S. JORGE.** (1944). *Caixa postal* 136. *Juiz de Fora*. *Minas Gerais*.
- ESPERANTO-KLUBO AZEREDO COUTINHO.** (1945). Sidejo: *Rua Afonso Pena*, 740. *Belo Horizonte*. *Minas Gerais*.

MEMORIGA FOLIO DE LA DEKA BRAZILA KONGRESO DE ESPERANTO

RIO DE JANEIRO — APRIL DE 1945



Ĉiu, kiu deziras ricevi kopion de la Memoriga Folio aŭ de Poŝtkarto kun la portreto de Zamenhof kun la du memorigaj poŝtmarkoj stampitaj je la dato de la fermo de la Dekaj Kongreso kaj stampaĵo farita de speciala stam-

pilo kun la portreto de Zamenhof kaj teksto en Esperanto, sendu peton al BRAZILA LIGO ESPERANTISTA — Praça da República, 54. Rio de Janeiro, Brazilo, akompanatan de dolar-triono aŭ ses respondkuponoj.

- ESPERANTO-GRUPO ZAMENHOF.**
(1945). *Rua General Vitorino*, 145. *Pôrto Alegre*. *Rio Grande do Sul*.
- ESPERANTISTA GRUPO EMANUEL.** (1945). Sidejo: 8.º *B. C. Casias*. *Rio Grande do Sul*.
- GRUPO ESPERANTISTA DE PARANÁ.** (1945). *Rua 15 de Novembro*, 384. *Curitiba*. *Paraná*.
- ESPERANTA GRUPO DE BARRA MANSA.** (1945). *Rua Domingos Mariano*, 276. *Barra Mansa*. Estado do *Rio*.

Karlo, de Edmond Privat

Facila legolibro por la lernado de Esperanto

Eldono de Brazila Ligo Esperantista
— *Praça da República*, 54.

Rio de Janeiro

Prezo: Cr\$ 3,00

Speciala prezo por grupoj:

12 ekzempleroj — Cr\$ 30,00

25 " — Cr\$ 50,00

Presejo: Irmãos Pongetti.